

LI ESTAS DIO DE LA VIVANTOJ, NE DE LA MORTINTOJ – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 20, 27-38

En tiu tempo alproksimiĝis al Jesuo kelkaj sadukeoj, kiuj ne kredas je la reviviĝo; kaj demandis Lin: «Majstro, Moseo lasis al ni ĉi tiun skribitan ordonon: Se iu mortas, kaj lasas edzinon sen infanoj, lia frato edziĝu al la vidvino, kaj tiel li havu de ŝi filojn anstataŭ la mortinta frato. Estis do iam sep fratoj. La unua edziĝis kaj mortis sen infanoj. Tiam edziĝis je la vidvino la dua kaj poste la tria, ne lasante infanojn; kaj same ĉiuj sep: ĉiuj mortis sen filoj. Laste mortis ankaŭ la virino. Kies edzino estos tiu virino post la reviviĝo? Ĉar ĉiuj sep fratoj havis ŝin kiel edzinon».

Jesuo respondis al ili: «Nur en ĉi tiu vivo homoj edziĝas kaj edziniĝas. Sed tiuj, kiuj reviviĝos el la mortintoj kaj estos juĝataj indaj je la estonta vivo kaj je la reviviĝo el la mortintoj, nek edziĝos, nek edziniĝos; ili ne plu povas morti, ĉar ili estas egalaj al la anĝeloj, kaj estas filoj de Dio, ĉar ili reviviĝis. Certe estas, ke la mortintoj reviviĝas: tion asertis ankaŭ la leĝo de Moseo, kiam ĝi parolas pri la arbetoj brulanta. Tie Moseo deklaras, ke la Sinjoro estas la Dio de Abraham, la Dio de Isaak kaj la Dio de Jakob. Pro tio Li estas Dio de vivantoj, ne de mortintoj, ĉar ĉiuj ricevas vivon de Li».

La sadukeoj bone aranĝis la kaptilon en kiun faligi Jesuon. Ili ne kuraĝas lin alfronti sur la doktrina kaj politika niveloj, ĉar ili scias ke ili povus esti venkitaj. Jesuo fakte jam silentigis per siaj respondoj la ĉefpastrojn, la leĝodoktorojn, la pliaĝulojn, kaj sukcesis lasi sen vortoj eĉ la plej trejnitaĵojn fariseojn.

Skribas la evangeliisto ke "tiuj", la fariseoj, "mirigitaj pro lia respondo, silentis". Aliflanke Jesuon ili ne povas elimini, pro la fakto ke Jesuo havis multnombrian sekvantaron inter la personoj, ili igus lin martiro. Kaj tiel la sadukeoj decidis lin altiri sur glitigan grundon de kie, post falo, la mesia kandidato havu malfacilaĵojn sin relevi, la ridindecon kaj la senestimiĝon.

La aristokrata pastra kasto de la sadukeoj, kies nomo venas de Sadok, la pastro kiu konsekris kiel reĝon Salomonon, la filon de David kaj de lia amatino Betsabea, anstataŭ la laŭrajtan reĝon Adonia. Tiu pastra kasto de la sadukeoj detenis ne nur la politikan povon, sed ankaŭ la ekonomian povon, ili estis tre riĉaj.

Ili akceptis kiel Dian Vorton nur la unuajn kvin librojn de la Biblio kaj malakceptis la librojn de la profetoj. Pro kio? Ĉar en la profetoj estas daŭra la denonco de Dio kontraŭ la maljusteco kiu kreas grandajn riĉaĵojn, sed ankaŭ multan malriĉaĵon. Ili do ĝin malakceptis ĉar por ili taŭgis la situacio tia kia ĝi estis.

Ili sin turnas al Jesuo per omaĝa titolo, *Majstro*, sed efektive ili ne iras por ricevi de li, ili volas nur lin senkreditigi. Kaj ili referencas al demando, kiu baziĝas sur la leĝo de Moseo, en la libro de la Levidoj, kie Moseo preskribas: Se mortas ies frato edziĝinta, sed sen gefiloj, lia frato edziĝu al la vidvino kaj donu idaron al sia frato.

Kia estas la signifo de tiu ĉi leĝo? La leĝo de la levirato antaŭvidis ke la bofrato de ino vidviniĝinta sen filoj estu devigata ŝin gravedigi, ĉar gravis ke la nomo de la edzo daŭru. Estis maniero por iĝi eternaj, por pludaŭrigi propran nomon; ĉiu filo havis la nomon de la patro.

Kiam ino vidviniĝis do kaj sen havi filon, la bofrato havis la devon ŝin gravedigi kaj la naskita infano havus la nomon de la mortinto. La leĝo preskribas: Tiel ke oni certigu al li la eternecon, kiel estas skribite en la libro de Readmono: Por ke la nomo de tiu ne estingiĝu el Israelo.

Laŭ la tiuepoka kulturo – kaj tion oni devas kompreni por pli bona kompreno de la peco – la geedziĝo havis la nuran celon certigi idaron al la viro, la ino utilis nure por naski idojn, filojn.

Ne temas do ĉi tie pri skrupulo pri la amo, sed pri realo de vira ido. Do, sin inspirante al la populara rakonto pri Sara, la malbonŝanca edzino kies eĉ sep edzoj mortis la saman geedziĝvesperon, la sadukeoj prezentas –

kiel se ĝi verus – la makabran okazaĵon de tiuj sep fratoj ĉiuj mortintaj sen sukcesi havi filon de tiu kiu estis la edzino de ĉiuj sep.

Pri la virino la sadukeoj tute ne interesiĝas, ili ne deziras koni la sorton de la virino, ili deziras nur scii kiu el la mortintoj, post la releviĝo, ŝin posedos por eternigi per maskla ido sian nomon. Ne temas do pri amproblemo (kies edzino ŝi estos?), sed pri kiu sukcesos havi masklan idon de tiu ĉi virino.

La sadukeoj do klopodas ridindigi Jesuon kaj primoki lin. Nu en sia respondo Jesuo distanciĝas de la popola interpreto de la releviĝo, komprenata kiel reveno de la mortintoj al fizika vivo, kaj Jesuo respondas ke la vivo de la releviĝintoj ne dependas de la generado, de la rilato inter geedzoj, sed ĝi venas rekte de la potenco de Dio.

Kaj Jesuo citas la anĝelojn. Kial Jesuo citas la anĝelojn? Ĉar la sadukeoj ne kredis je la ekzisto de la anĝeloj. Samkiel la anĝeloj ricevas la vivon certe ne de la gepatroj, sed rekte de Dio, tiel per la releviĝo la vivo restas eterna ĉar ĝi venas de Dio.

Al la sadukeoj, kiuj baziĝis sur la aŭtoritateco de Moseo por kontraŭstari Jesuon, Jesuo siavice rebatas, sin rilatigante ĝuste kun Moseo, al tiu kion li skribis, montrante kiom miopa kaj limigita estis ilia legado de la skriboj, kaj li referencas al la respondo kiun Dio donis al Moseo en la fama epizodo de la arda rubusejo, kiam li diris: *“La Sinjoro estas la Dio de Abrahamo, la Dio de Izaako, la Dio de Jakobo”*.

Kiam oni diras ke la Sinjoro estas la Dio de... oni ne celas tiom la Dion je kiu kredis .. Abrahamo, Izaako aŭ Jakobo, sed la Dion kiu protektas Abrahamon, Izaakon kaj Jakobon. Kaj kiel li ilin protektas? Li ilin protektas per sia vivo, ilin tenante malproksime de la morto.

Esti sub la protekto de Dio do signifas havi lian saman vivon kaj la fidela Dio ne permesas ke mortu tiuj, kiujn li amis. Kaj la kialon diras al ni la plej grava frazo de la tuta peco, kiu ĵetas novan lumon sur la bildon de la vivo, de la morto kaj de la releviĝo, *“Li estas Dio de vivantoj, ne de mortintoj, ĉar ĉiuj ricevas vivon de Li.”*

La Dio de Jesuo ne relevigas la mortintojn, sed komunikas al la vivuloj, al la vivantoj, sian saman vivon, vivon de tia kvalito kiu kapablas superi la morton.

